

# La 40-a Konferenco de Int. Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Ranzan (Japanio) 11 – 19 aŭgusto

**Temo: Virironj en la Esperanto-kulturo**

**Konferenceto:** la **Ŝtata Edukcentro por Virinoj**

Ĝi estas granda konstruaĵo kaj preskaŭ kiel hotelo. Kelkaj ĉambroj estas okcidentstile, aliaj japanstile (neniu lito). La 3 manĝoj ankaŭ estas japanstile (3 foje rizo kun "nekonataj aldonaĵoj"). Kelkfoje je la matenmanĝo kadetoj kun kolbasetoj anstataŭ rizo. Ni ne ricevis ĉiam la saman ĉambbron por kunveni, kio donis al Aida zorgojn.



**Partoprenintoj:** Sepdekunu ekz. de Kubo, Usono, Irano kaj Nepalo, vere diversnacie. El Svedio nur Gunnar Olsson kaj Wim Posthuma. Tri partoprenintoj de la nova UEA estraro: Claude Nourmont, Ranieri Clerici kaj Hori Jasuo

**ILEI estraro:** Mihai Trifoi, Aida Ĉizikaité, Yas Kawamura kaj Zsofia Korody. Tiekio Isikawa, estro de Japana sekcio de ILEI, havis la ĉefan organizadon. Aida estis la "polico", kiun ni devis obei. Ŝi respondecis pri la programo.

**Programo:** Ĝi estis abunda. Plej parte la partoprenintoj respondecis pri ĝi, kiel Simpozio, Seminarioj, Ekzamenoj, Ĝenerala Asembleo (mi havis alain taskon tiam), Lingva Festivalo, prelegoj, diversaj kursoj pri Japanaj tradicioj aŭ arto, filmoj, danco, koncertoj (unupersona), 4 ekskursoj (al Nikko okazis la tutan tagon merkrede. Ekde ĵaŭde nur parto de la tago okazis ili



Aida, la ĉarma, tamen rezoluta "policistino"

Rimarkoj: Mi intencis montri 2 filmojn sur DVD: 1. pri la vojaĝo al Nepalo en 2000. 2. filmo pri nia E-domo. Ili estis anoncintaj. Tio ne okazis pro manko de tempo kaj ĉar la Japana DVDiloj ne kongruas kun niaj.

Mi tamen ricevis 30 minutojn por rakonti pri nia E-Domo kaj mi varbis iun kiu volas helpi dum la somero

Mi ankaŭ anoncis instrui Usonajn kvadratdancojn. Tio parte okazis, ĉar la salono estis tro malgranda.

Nova programero estis: Dancado laŭ kubaj kaj aliaj ritmoj ĝis la 23.00 horo. (mia alia propono.

Lingva Festivalo. Dennis Keefe ĝin organizis ne kiel merkato, sed kiel samtempaj lecionoj de 20 min en 3 sesioj. Tio ne estas alloga.

Dudek lingvoj estis prezentitaj i.a:

La franca, la finna, la kroata, la sveda, - la hispana, la angla, esperanto, la japana, la nederlanda, la litova, la itala, - la serba, la latva, la rusa, la persa, la nepala, la rumana, la hungara, la germana..

Mi prizorgis la svedan kaj nederlandan lingvojn. La unua havis 1 partopreninton (Tiekio) kaj la dua kvin. La Persa lingvo altiris la plej multajn partoprenintojn



## Resume

La konferenco donis agrablan etoson. Estisi alloge partopreni prelegojn kaj lerni pri la Japana E-movado kaj ties pioniroj nunaj kaj intaj. Ankau estis bone lerni pri japanaj tradicioj per kursoj, ekskursaoj kaj "kiel manĝi". Mi ankau havis eblecon pli bone koni "gravajn" samideanojn en la E-Movado, ne nur ILEIanojn. Mi miris pri la granda nombro de ili dum la tagoj en Ranzan.

Västerås, 2007-10-11 – 11

### Wim Posthuma



Dennis Keefe informas nin pri la Lingva Festivalo



La rezulto de plantaranĝo de Julian Hernandez kaj mi dum la Ikebana kurso



Yasuo montros diversajn muzikilojn



Reprezentantoj de **Balkano**



Ne oficiala kunveno. Kelkaj renkontis Yuko, kiu estis en Lesjöfors junio 2007 por informi ŝin pri la Japana ILEI.



Tiel ni manĝis, eĉ mane, tri foj—ojn tage



Trajne al **Kawagoe**, kiu estas iama ĉefurbo de Japanio. Ni staras en vico por ricevi monon por lunĉi. I.a Mihai Trifoi

